

& Maldolça kanto:

< Rekante 17 el 31 batoj por strofo, entute 217 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Mondo kaj koro, 1921). Baladigis Martin Strid (2015) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Al la semanto.>

(#Melodio:

<:31> (a;do /(domi somi remi faami;mi remi fare fami doodo;do)×

(#Rekantaĵe: LaLado miso somi remi; fami reremi fami domi; TiTire dore doTi LaSo LaLa La)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 Ek/iri, kiel la migruloj... ; Sen cel',
sen hejmo vagi sola, ; Ne turnu sin plu
la okuloj ; Al la ĉielo senkonsola!

(×:; **Do paŝu fiere en la ĉeno ; Manoj
kune en firma teno ; Aŭdi rakonton
de la klara voĉo jen.)**

'2 Nur ridi belon la naivan ; De la
printempa floroĉarmo, ; Kaj lipon havi,
sensoifan, ; Avare ŝpari je la larmo

'3 Rezigni pri ja vana lukto, ; feliĉon
ankaŭ venk' ne portos, ; Rezigni pri la
amvolupto ; Sciante, ke en naŭz' ĝi
mortos.

'4 Ne lasi plu, ke min ektentu ; Am' de
virino, de amiko. ; Brilegaj aĵoj, sed,
atentu!, ; Dissaltos, kiel sapveziko.

'5 Kaj se espero ŝajnus, rava, ; Ne kapti
ĝin per mano trema, ; Ĉar ĝi ne estas
ŝnuro sava, ; Araneaĵ' nur, ŝirigema.
.....

'6 Kaj iri nur, sen cel', sed fido, ; Sen
idealaj, sen deziro, ; Sur vangoj, sen la
ŝmink' de rido, ; Kaj pri la mort': kun
ŝultrektiro...

'7 Kun frostaj vangoj, frosta sento ;
Ekfali sur la bulon teran, ; Kaj kun la
vekrianta vento, ; Ekkanti kanton
malesperan...)